6-a Jaro N-o 296 APERAS SEMAJNE Leipzig, 5./6. 1930



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Kolmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerfiner

KRIZO EN GERMANIO

Triono el la industriaj laboristoj en Germanio aŭ tute aŭ parte senlaboras. Je 31. januaro 1930 la nombro da senlaboruloj estis 3,2 milionoj, k da laboristoj, kiuj laboras malpli ol normalajn horojn — 1,3 miliono (laŭ *Economist* de 8. marto). De tiu dato la nombro plialtiĝis.

La *Commercial* raportas: — "Ne forpasas eĉ unu semajno sen konsiderindaj paŝoj al raciigo en unu aŭ alia kampo de l' germana komerco k industrio. Sennombraj firmoj senbrue unuiĝas k sennombraj fabrikoj silentas, por antaŭenpuŝi la procezon de raciigo." (6. marto.)

Tiu procezo signifas, ke pliaj miloj da laboristoj ĵetiĝas sur la stratojn senĉese k por ĉiam[1]. Lastan jaron ekz. la grandega elektrotrusto AEG, sklavo al tiuj samaj usonaj kapitalistoj kiel estas la Brita Asociita Elektra Industrio (*British Associated Electrical Industries*), maldungis 5 000 el siaj 60 000 laboristoj, t. e. 8% (*Commercial Annual Review*). Ĉi tiu senĉesa fluo aldoniĝas al la milionoj, kiuj estas senlaboraj pro la ekonomia krizo, kiu rapide estiĝis post la mallonga prosper-periodo dum la somero de 1929. La produkta normo, t. e. 100 en 1928, falis de 110% en junio ĝis 101% en oktobro, ĝis 96% en januaro.

Komerco k industrio

Dum 1929 la germana kapitalo sukcesis pliigi la produktadon precipe en la "pezaj" industrioj (fero, ŝtalo, ktp.). La produktado de ŝtalaj fandblokoj pliiĝis de 14,5 milionoj da milkilogramoj en 1928 ĝis 16,3 milionoj da mk. g. en 1929. Produktado de karbo pliiĝis de 15 084 000 ĝis 16 340 000 da mk. g. La pliiĝo malprogresis dum fino de la jaro. En decembro la ŝtalproduktado estis 1 156 000 da mk. g. kompare kun la plej alta nivelo de 1 466 000 (julio) k monata mez-kvanta produktado de 1 369 000 (en 1928 — 1 210 000). Karbo, 13 652 000 da mk. g. en decembro, kompare kun 14 467 000 (la plej alta nivelo) en aŭgusto. La kroma produktado estis plejgrandparte por eksporto, ĉar la enlanda merkato malvigliĝis pro raciigo. Estis unu miliono da senlaboruloj dum la plej favora tempo de la prosperperiodo.



Rezulte de la pliiĝo de eksporto k malpliiĝo de importo la nombroj pri komerco por la jaro montris renverson de la imponaj eksportsaldoj, kiuj karakterizis jarojn 1927 k 1928. Anstataŭ la debetoj de 710 milionoj k 300 milionoj da dolaroj en tiuj jaroj montriĝis, en 1929, kredito de preskaŭ 12 milionoj. La valoro de eksportitaj varoj, 32 000 milionoj da dol., atingis post-militan maksimumon. Tamen, ankaŭ ĉi tiuj nombroj komencis malkreski dum la finaj monatoj de l' jaro. Eksporto de germanaj varoj je 290 milionoj da dol. en oktobro falis ĝis 250 mil. en decembro. Importitaj varoj valoris malpli ol dum 1927 aŭ 1928, parte pro la malpliiĝinta aĉetkapablo de la laboristoj k parte pro la malpli granda aĉetado de krudaj materialoj, kiam industrio malprogresis. Ĉi tiuj tendencoj daŭras dum 1930.

Manko de kredito

La rapidega kresko de produktado k komerco ne baziĝis sur solidaj aŭ daŭraj fundamentoj. Ĝin kaŭzis la peno forigi la mankon de kapitalo —

---

[1] Ĉu por ĉiam? S-o Jozuo Stemp (*Sir Josiah Stamp*), ekonomiisto, skribas en "The Present Position of Rationalisation" (La nuntempa stato de raciigo): "Ne ekzistas ia dubo, ke raciigo jam faris gravan, sed malhelpan kontribuon al la problemo pri senlaboreco. Maŝinoj forpuŝis laboristojn multe pli rapide ol tiuj laboristoj dungiĝas aliloke." Plue li skribas: "Ĥirurgia operacio eble estos necesa" k tio kondukos al "eventuala pliigo de aĉetkapablo en aliaj kampoj, kiun povas okazigi malpli altaj kostoj" t. e. al eventuala revigliĝo de kapitalismo. Kompreneble, *povas* esti, ke iu firmo post raciigo elmontras la fakton, ke ĝi dungas pli multajn laboristojn a) se ĝi apartenas al kreskanta fako de kapitalismo, ekz. ĥemiaĵoj aŭ artefarita silko — tio estas portempa, k je kosto de la pli malfortaj fakoj; aŭ b) se la komparo estas inter vigla k malvigla periodoj. Tiajn ciferojn oni devas kritikeme akcepti.

antaŭe provizitan per usona subvencio al raciigo. Sed tiu subvencio parte ĉesis post la Ŭol-strata (*Wall Street*)[1] floregado k falego. La plej gravaj kreditŝanĝoj estis:

	1928	1929
	milionoj da dolaroj	
Enlandaj pruntoj	750	575
Enlandaj akcioj eldonitaj . .	180	115
Eksterlandaj akcioj eldonitaj	390	145
Neta importo de kapitalo . .	725	430
Cirkulado de banknotoj (jarfino)	1 365	1 360
Rezervo da oro	680	570
Spezo de garantioj ĉiuspecaj en la borso	14 375	9 375
Bankrotoj	55 000	75 000

(Mallongigo el Jara Revuo de *Economist*)

Ĉi tiuj nombroj ne estas tiuj de prospera kapitalismo. Ili montras, ke la enlanda provizo de kapitalo ne pliiĝis por ekvilibrigi la velkon de la eksterlanda provizo, kiu, tamen, restis granda. La koloniigo de Germanio daŭris, ekz. Zimens (*Siemens*), la granda elektro-trusto, estis devigata submetiĝi al parta estriĝo de la usona *Ĝenerala Elektra (General Elektric)*, kiu jam posedis intereson je ĝia konkuranto: *AEG*.

Raciigitan industrion oni ekspluatis kiel eble plej forte por egaligi la diferencon — sed oni ne sukcesis. Oni malsukcesis kaŭze de la konfliktoj propraj al la germana kapitalismo. La manko de kredito signifis, ke flua kapitalo estis multekosta. Bank-pruntoj estis minimume je 9% k foje ĝis 12½%. Kaj la peza ŝarĝo de pasinta raciigo, kune kun promilitaj kompenspagoj, premegis sur industrion.

La trustoj plifortiĝas

Ĉi tiuj faktoj rezultigis pli grandan forton al la pli potencaj trustoj, kiuj, en Germanio, kooperas kun financaj trustoj, kiuj, siavice, plej ofte havas eksterlandan subtenon. Bank-diskontoj k pruntoj plialtiĝis de 700 milionoj ĝis 775 milionoj da dol. dum la jaro, kiu fakto evidentigas la kreskantan regadon de la bankoj, dum la abrupta kresko je bankrotoj evidentigas la manieron, laŭ kiu la mezklasaj malgrandaj firmoj estis subpremataj. La plej granda bankroto, tiu de la dua asekura firmo laŭ gravo, je 12,5 milionoj da dol. similis laŭ amplekso de la rezultoj la Hetri (*Hatry*)-bankroton (en Anglio). La maniero, laŭ kiu la karteloj daŭrigis siajn altajn prezojn, estas rimarkinda signo de ilia forto. Dum la periodo de januaro 1929 ĝis januaro 1930 "liberaj" prezoj falis de 101,9 ĝis 90,4, dum "kontrolitaj" (trust-fiksitaj) prezoj fakte plialtiĝis de 101,9 ĝis 105 (1926 = 100). Estas dubinde, ĉu tiuj prezoj povos daŭri, se oni konsideras la falegon de la mondprezo, sed la premego de ĉi tiuj monopol-prezoj sur neorganizitan industrion k sur la laboristojn estas terura. Ĉi tiuj altaj enlandaj prezoj estas la "postgvardio", kiu ebligas la grandkvantan eksportadon.

Ŝtal-trusto

La sperto de la germana ŝtal-trusto, kiu superregas 40% de la produktado de fero k ŝtalo k 25% de karbo — la plej granda korporacio inter la kateloj de la "pezaj" industrioj — montras, kiel la trustoj daŭrigis sian stabilon. La kapitalo de l' trusto estas 200 milionoj da dolaroj. Ĉe sia fondiĝo en 1926 la trusto akiris pruntojn el Usono je 150 milionoj. Dum la sekvintaj tri jaroj ĝi elspezis 75 milionojn por aĉeto de nova maŝinaro k ekipo, dum ĝi grandskale fermis nebezonitajn fabrikojn. Profiton de 39,4 mil. da dol. ĝi gajnis dum tiuj tri jaroj k pagis dividendon je 18%. 70 milionoj estas "forviŝitaj" (amortizitaj). Dum 1929 ĝi pagis rentumon pro pruntoj je 8,5 mil. da dol., impostojn je 15 mil. k pro "sociaj servoj" 14,25 mil.

La nombroj pri tekniko indikas, kiel la trusto akiris ĉi tiujn rezultojn. Karbonproduktantaj "korpusetoj" (ĉu: taĉmentoj? *Red.*) malplinombriĝis de 48 ĝis 32, sed la taga produktokvanto pliiĝis je 21%. La meza produktokvanto po laboristo dum laborperiodo (ĉiuj laboristoj) estis proks. 13 kilogr. en 1929; antaŭ la milito la meza produktokvanto en Rur (*Ruhr*) estis 9,3 kg., k sama en 1925. La trusta meza produkto superas la nuntempan Rur-kvoton je 0,88 kg.; ĉi tiu diferenco aperis lastan jaron. (Brita mezkvanto, kun ½-horon pli longa periodo estas 10,7 kg., Jorkŝar [*Yorkshire*], sama periodo 11,59 kg.).

Similajn rezultojn la trusto havis en la ŝtal-fako. La laboristoj sukcesis devigi la truston cedi kelkajn negravajn konsentojn. La meza laborpago lastan jaron estis dol. 640 (nur 11 monatoj, pro striko) kompare kun proks. 620 dol. dum la antaŭa plena jaro k dol. 590 dum 1927. Semajna salajro de iom pli ol 13,5 dol. estas nesufiĉa kompenso por la pliigita ŝvitlaboro; k, ĉiuokaze, senlaboreco k la jam nun okazanta nova krizo minacas eĉ ĉi tiun salajron.

Eĉ rilate la potencajn trustojn, tamen, la akumulado de ekstraj valoroj ne sufiĉis por subteni la kapitalismon; fakte, granda parto de l' eksporto rezultigis perdon.

Nepenetrebla muro

La direktoroj de ĉi tiu giganta trusto konsentas (kiel ja ilustras la nuntempa krizo), ke raciigo, sola, ne sufiĉas. Ili eldiras (laŭ *"The Economist"*) ke,

> "se la gvidantoj de la nacio ne enkondukas multampleksajn metodojn (por plibonigi la financan staton), kiuj metodoj ampleksu severan nacian ŝparadon k ŝanĝojn rilate impostojn k financan agadmanieron, la senĉesa raciigo, enkondukita per helpo de fremda kapitalo prunteprenita je alta kosto, rezultigos pli grandajn ŝuldon k mankon de laboro, anstataŭ pliigitan forton rilate konkuradon".

Fakte la germanaj industriistoj renkontas nepenetreblan muron. Iliaj eksportaĵoj, anstataŭ esti kapitalaj eksportaĵoj, kiuj rezultigas profiton al la nacio, estas prenitaj de brita, franca, itala, k.c. (k fine usona) imperiismoj kiel promilitaj kompenspagoj. Tiuj kompenspagoj antaŭe estis pagitaj el enspezo de fremdaj pruntoj. Lastan jaron ili sumis je 535 milionoj da dolaroj, — pli ol la duoblo de la komerca kreditsaldo (ne inkluzive la kompenspagoj faritaj sub formo de varoj).

Plie, pro la krizo en Usono, malkaraj eksportaĵoj el *tiu* lando konkuras, en la mondmerkato, kun tiuj de Germanio.

Tial la atako de la kapitalistoj pli k pli koncentriĝas kontraŭ la laboristoj, kun celo daŭrigi la firmon de germana kapitalo k pliigi la bezonatajn monhavojn, kiuj provizas la financan mekanismon per kreditoj ktp.

Ŝtata bankroto

La apogeo de la krizo montriĝas en la manovrado de la ŝtataj financaferoj. Je fino de junio la buĝeto de la Centra Ŝtatkaso malkovros deficiton de proks. 68 milionoj da dol. La subvencioj al senlaboruloj estas grandegaj — inter 135 milionoj k 185 mil. da dol. jare[1]. La deficito de la senlaborula kaso estas 112,5 milionoj; k ilin oni intencas havigi per pliigo de la nutraĵ- k trinkaĵimpostoj k pli granda pago de la dungitoj. La ŝtato montris sian malforton, kiam ĝi akceptis la proponon de la Sveda Alumet-Trusto pruntedoni 125 mil. da dol. interŝanĝe por la alumet-monopolo en Germanio. Sekve de la intertraktoj en Parizo k Hago (kie la germanaj delegitoj akiris preskaŭ neniajn cedojn) la komercigo de la promilitaj kompenspagoj faros el ĉi lastaj ĉiamdaŭran fordrenadon de kapitalo; ne forigebla pere de politika traktado, la komerca ŝuldo estas prizorgata de la Banko por Internacia Saldreguligo. Francio baldaŭ enmetos sian parton de la senkondiĉaj kompenspagoj en la mondmerkato sub formo de monrezervoj. Ĝia parto (unu triono) estas 120 mil. da dol. k Germanio rajtas investi samtempe 120 milionojn. J. P. Morgan estas la decidonto pri la dato k maniero de l' enmeto. (Laŭ *Commercial Annual Review*.)

La urboj k ŝtatoj troviĝas en simila situacio. Berlino ekz. sukcesis pruntepreni monon je *9%* nur post submetiĝo al usonaj diktatoroj, kiuj postulis, ke ĝi rezignu sian memregadon, plialtigu konsum-prezojn al laboristoj k hipoteku siajn akciojn en la germanaj gas-produktejoj. La havigo de ma-

---

[1] Kvartalo de l' usonaj financkapitalistoj. — *Red.*

[1] Tamen ili tute ne sufiĉas por certigi homindan ekziston al la el laborado elĵetitaj proletoj. — *Red.*

ĈIRKAŬ LA LABORISTAJ ORGANIZOJ

La lernejo de la ADGB[1] en Bernaŭ

La germanaj sindikatoj okupas sin ne nur pri altigo de la salajroj k pri diversspecaj asekuroj al siaj membroj. Kiel gravan taskon ili konsideras la klerigadon al la membraro. Tiucele oni aranĝas multe da kursoj, semajnfinaj, libertempaj aŭ nur vesperaj, instalas bibliotekojn, presigas klerigajn paĝojn en la sindikataj ĵurnaloj ktp.

La centrejo de la germanaj sindikatoj (Amsterdamaj) ĵus malfermis grandegan lernejon por grandskala klerigo al junaj sindikatanoj. Ĝi estas lokita en Bernaŭ, urbeto proksime de Berlin. La kostoj por konstrui tiun modernan lernejon, estis 1,6 milionoj da markoj (proks. 400 mil dol.) pagotaj de la sindikatoj aniĝintaj al ADGB. Estas loko por 120 studantoj. Ili loĝas duope en 60 ĉambroj. La instruado okazas en 5 klasĉambroj k gimnastejo. Ne mankas festsalono por 200 personoj, banejoj, komuna manĝejo, biblioteko k legejo. La kursanoj restas dum 4 semajnoj en la lernejo k estas instruataj pri politika ekonomio, sociologio, laborista juro, laboreja higieno, organizaj aferoj k aliaj temoj. Ili estas delegataj de la unuopaj sindikatoj, kiuj pagas ankaŭ la kostojn de la instruado k restado.

SAT-ano 3018.

Kooperativoj kaj 1-a de Majo

Leginte en n-o 293 artikoleton sub supra titolo, mi tre miris pri tio, ke nuntempe troviĝas laboristaj kooperativoj, fonditaj de laboristaj gvidantoj k ankaŭ administrataj de ili, en kiuj povas diskutiĝi la demando: Ĉu povus aŭ devas festi en unuamaja tago kooperativ-laboristoj? Ĝis nun mi opiniis, ke kiel en Ĉeĥoslovakio aŭ Aŭstrio, de komenco de l' batalo pri unuamaja festotago (de 1. 5. 1890 ĝis 1930), ĉiam estis k estas kooperativaj laboristoj en unua vico de por festado batalantaj laboristoj. En la du nomitaj landoj unuavice la kooperativoj ne malfermas je 1. 5. siajn laborejojn k vendejojn. Ili ne nur ne laboras la tutan tagon, sed al siaj laboristoj pagis k pagas plenan salajron. Mi opiniis tion memkomprenebla k nediskutebla. Ke ĉe holandaj lab. kooperativoj tiu rajto ne ekzistas, tre mirigas min, k precipe la fakto, ke eĉ holandaj lab.-kooperativaj gvidantoj kontraŭstaras tiun naturan rajton. Ĉu ili ne estas laboristoj? K-do Zaĥte (14 562) diru al sia estraro, ke pro ekonomiaj konsideroj ili sin turnu al la modelo festi unuamajan tagon, donita de ĉeĥoslovakia k aŭstria socialdemokrata lab. partio. Mi nur bedaŭras, ke la holandaj lab.-kooperativaj estroj ĝis nun sentas sin ligitaj pli forte al la kapitalista devizo "profito" ol al la devizo de l' tutmonda proletaro — "proletamasoj ĉiulandaj liberigu vin".

Knourek (2474), Vieno.

[1] ADGB = Ĝenerala Sindikatara Asocio Germania.

LA INDUSTRI-AKADEMIO EN MOSKVO

De la unuaj tagoj de la Oktobra revolucio granda parto de la industri-gvidantoj de la malnova Rusio malkonsentis labori por la Soveta reĝimo. La Soveta registaro estis do devigita altiri al la gvidado de la entreprenoj spertajn laboristojn, kiuj tiele fariĝis la "ruĝaj direktoroj".



La Domo de l' Profesiaj Unuiĝoj en Moskvo, feste lumigita okaze de l' 1-a de Majo

Fotogr. esp-isto I. F. Mitrofanov

Ĉi tiuj 'ruĝaj direktoroj', bonaj praktikaj ekonomiistoj, proletoj, fidelaj al la soveta registaro, tamen sentis grandajn malhelpojn pro la foresto de la teoriaj scioj.

Ĉio ĉi metis la problemon nepre altigi la kvalifikon, doni iun sumon da teoriaj scioj al la estranta administrantaro (al la ruĝaj fabrik-direktoroj, direkcianoj de la trustoj ktp.).

Pro la neeblo depreni de la produktantaj industriejoj grandan nombron da gvidantoj en la industrio, oni kreis en la j. 1925 aron da vesperaj kursoj, ĉe kiuj la direktoroj povis dum la vesperaj horoj akiri la necesajn teoriajn sciojn. Per tiu paŝo oni multon atingis, sed kun ĉiu plua jaro oni sentis, ke ĝi ne estas plene kontentiga. La abunda kresko de la industrio, ĝia rekonstruo k raciigo, devigis starigi la problemon pri la neceso doni pli vastajn k profundajn sciojn al la gvidantaro de la industrio k por tiu celo estis kreita en la jaro 1927 ĉe la Supera Konsilantaro por la Ŝtatekonomio de USSR — la Industri-akademio *(Promakademija)*. — Ĝia lerntempo estis fiksita tri-jara kun nepra konsidero, ke ĉe la unua kurso oni studu la ĝeneralklerigajn sciojn (matematikon, rusan lingvon, fremdajn lingvojn, fizikon, ĥemion, desegnadon, historion de la ekonomia evoluo, ekonomi-geografion, politikan ekonomion) k ĉe la du sekvantaj kursoj, oni studu, krom la ĝeneralklerigaj, ankoraŭ specialajn k ekonomisciencajn fakojn: teknikan mekanikon, varmo- k movoteknikon, specialan teknologion, organizadon de la industriaj entreprenoj, ekonomion de la industrio, fabrik-manufakturan librotenadon, statistikon ktp.

Ĝenerale la Akademio celas prepari por la industrio la administro-gvidan estraron, kiu posedu la necesan tekniko-ekonomian preparitecon: la direktorojn de la trustoj, direktorojn k vic-direktorojn de la entreprenoj, membrojn de la regionaj (landaj) konsilantaroj por la ŝtatekonomio, ties anstataŭantojn, ĉefojn k membrojn de la gvidkolegioj, fakestrojn k direktorojn por la Supera Konsilantaro de la ŝtatekonomio.

Oni akceptas por la lernado en la

---

gistrataj pruntoj en Usono nun estas sub severa kontrolo k estas preskaŭ neebla. Ĝenerala ekzameno k ordigo pri la financaj aferoj de l' urboj k ŝtatoj estas, ŝajne, neeviteblaj, kontraŭ ebla bankroto.

Socia krizo

Sub kondiĉoj de ekonomia krizo kreskas faŝismo k kapitalista diktatoreco. La kapitalistoj postulas nuligon de sociaj servoj, malaltigon de salajroj, malaltigon de subvencioj al senlaboruloj, pli altajn tributpagojn de l' dungitoj, ŝparadon rilate specialajn ŝtatentreprenojn por senlaboruloj, k (ĉe la "dekstruloj"[1]) leviĝas protestoj kontraŭ promilitaj kompenspagoj. La centro (mezaj partioj) ŝanceliĝas pro la konfliktoj inter la du flankoj.

La kapitalistoj enviciĝas kun siaj konkurantoj kontraŭ Sovetio.

Pro du kaŭzoj, la ĉiamkreskanta premego sur la laboristojn k la velko de la kapitalista ekonomio, ekaperas revolucia situacio, k en 1930 povas esti, ke Germanio staros antaŭ pli grava krizo ol nura senlaboreco.

El "The Monthly Circular of the Labour Research Department" (*Monata informilo de la Laborista Enketa Fako*) tradukis *W. A. G.*

[1] Ekstremaj reakciuloj. — *Red.*

Industri-akademio personojn, kiuj okupas postenojn de fabrik-direktoroj, administracianojn de la trustoj k parti-sindikatajn funkciulojn, kiuj posedas ne malpli ol 3—5 jarojn da administro-produktanta oficosperto. La aĝlimo estas fiksita ne pli ol 35-jara. Nuntempe la Industri-akademio en Moskvo posedas 450 instruatojn por la diversaj industri-fakoj (metala, teksa, ĥemia, montmineja, ligno-forsta[1] ktp.).

Estas starigitaj filioj de la Akademio en urboj Leningrad k Baku, projektitaj k starigataj en Ĥarkov, Donbasa regiono, Urala lando k Siberio.

En la kuranta jaro la Industri-akademio de Moskvo donos la unuan kursanaron finintan la Akademion. La kursanoj estas bonaj praktikuloj, ekonomi-spertuloj, produktistoj, posedas la viv-spertitan kutimon k konas sian produkto-fakon. Tiu cirkonstanco permesis depreni el la lernoplanoj k programoj multajn objektojn, kiuj estas instruataj en la superaj k teknikaj lernejoj.

La instruatoj ricevas salajron, laŭ la normo de la lasta tarifa salajrosumo, je la konto de la respektiva institucio, kiu sendis ilin al la akademiaj studoj, ili senpage ricevas la lernolibrojn, lernilojn, loĝejon ktp. Dum ĉiu jaro krom la instruokupado la kursanoj faras praktikajn ekskursojn k laboras ne malpli ol monaton ĉe la respektiva produktejo. La urĝa bezono por la funkciuloj, neeblo lasi al ili longan tempon foresti de la ofico, starigis la problemon mallongigi ilian instruadon en la Industri-akademio ĝis 2 jaroj, kun tia kombino, ke la preparado por la ĝeneralklerigaj objektoj estu kondukata antaŭ la veno al la Akademio, pere de la vesperaj aŭ korespondaj kursoj. Ambaŭ tiuj punktoj nuntempe estas sufiĉe preparitaj k ne pli malfrue ol la sekvontan jaron en la Industri-akademio oni havos la dujaran lernoperiodon.

Rektoro de la Industria Akademio
A. Kamenskij.

[1] Forsto = kulturita arbaro.

Havinda eldonaĵo de SAT estas

Prologo

Poemaro originala de **E. Miĥalski**
64 pĝ. kun titolbildo

Ĉiu homo travivas horojn, en kiuj li serĉas konsolon aŭ emas revi k satiĝi en dolĉa revado. Bela poezio estas mirinda satigilo. La lirikaj poemoj de Miĥalski, en sia literatura formo senriproĉaj, meritas esti en la manoj de ĉiuj poezi-amikoj.

Prezo: **0.70** mk. g.

Mendu ĉe **Administrejo de SAT,**
Colmstr. 1, **Leipzig O 27.**

POLICISTOJ KIEL ŜTELISTOJ

La diktaturo en Portugalio

Mi k mia K-do Cederholm (15 649) estas arestitaj multfoje, k tial ni nun povas diri, ke ni estas viktimoj pro SAT.

Post la unua nokto en Porto ni estis demanditaj de la policistoj pri nia pasporto, kiu, laŭ la opinio de la limgardistoj, estis tre bona, sed bedaŭrinde ĉi tiuj ne stampis, kvankam ni petis; ili diris, ke tio estas nenecesa. Nu, je la unua mateno en la hotelo policisto venis k prenis, nenion dirante, niajn pasportojn. Kompreneble ni estis tre malfeliĉaj — ho, vojaĝanto, ne pensu iri sen dokumentaĵoj! — k tuj ni rapidegis al la policejo. Tie oni nin petis sidiĝi, kion ni ankaŭ faris. Sed kiam ni ekmalpacienciĝis — ni k K-do Ribeiro en Porto decidis renkonton je la dek tria horo, kiu tempo jam pasis — k petis ricevi niajn pasportojn, la policistoj tuj kredis, ke ni estas friponoj, kiuj intencas malaperi. Kiel trompistoj akompanitaj al la policestro, la eldemandado komenciĝis. En la germana lingvo ili trovis inter niaj aĵoj malgrandan artikolon pri parolado, kiun mi faris en Essen k ankaŭ alian noton, en kiu la vorto *Sovetio* ekzistis. Tuj la policistoj estis konvinkitaj pri nia friponeco k arestis nin. Oni akompanis min al speciala ĉelo por friponegoj, sed kun mia K-do oni daŭrigis la eldemandadon. Li nenion ricevis por manĝi, sed se li volus diri, ke Rusio sendis monon al mi por fari propagandon, li tuj estus libera k la portugala respubliko donus al li senpagan vojaĝon al Lisbono, en kiu urbo ni ambaŭ havis leterojn kun mono de fama verkisto en Svedio. Sed li preferis malsati anstataŭ diri malveron. Dum 15 tagoj ni nun estis malliberigitaj en malsamaj ĉeloj, k ĉiun tagon ni estis demandataj terure. Ni ne scias paroli la portugalan lingvon, sed sufiĉe ni komprenas por scii, ke la polica interpretisto vole eraris, tradukante en la portugalan el la germana, per kiu lasta lingvo oni nin eldemandis. Vidu denove la neceson de esperanto ĉie en la tuta mondo!

Ankaŭ K-do Ribeiro estis arestita. Kial? Aŭskultu! *Pro tio, ke li parolis kun ni.* Eble ni havas teruran bacilon!

La manĝaĵo, kiun ni ricevis en la malliberejo, eĉ ne estis taŭga por la porkoj. La nura, kiun ni povis manĝi, estis la malfreŝa pano. La malpuro en la ĉelo estis sub ĉiu kritiko: la plankon oni ofte ne povis vidi pro ekskremento k urino. Mia ĉelo estis la plej malbona, k post kelkaj tagoj oni ĵetis al mi frenezulon kiel kunulon.

Komprenante, ke ili ne pli longe povas teni nin en malliberejo pro politika propagando — per malgranda anonco en germana lingvo oni eĉ ne en Portugalio povas fari komunistan propagandon — la policistoj turnis la aferon: ni estis ŝtelistoj, grandaj ŝtelistoj. 30 mil kronoj malaperis en sveda banko.

— Ĉu vi ne prenis tiujn monsumojn por uzi ĉi tie? demandis min la policestro.

Spite mia mizero mi ridegis en la aeron k respondis:

— Estas kiel novelo. Kore mi dankas vin, ĉar mi ĵus ricevis penson por tre interesa novelo. Ho, pardonu, sed mi devas rideti! Tri viroj faras revolucion en Porto, post kiam ili unue prenis 30 mil kronojn en sveda banko.

La venontan tagon ni estis sendataj trans la limon en Hispanion. La aferon pri la 30 mil kronoj la policistoj eksciis el noto, krajone kadrita, en gazeto, kiun la patro de mia amiko sendis kiel novaĵon al li.

Sed niajn taglibrojn, leterojn, kelkajn vestojn, personajn dokumentojn, fotojn, vortarojn, membrokartojn de SAT, jarlibrojn ktp., jes, vere eĉ *nian monon* ŝtelis la policistoj. Kun rido la policisto, kiu akompanis nin al la limo, diris, ke ni en Vigo ricevos niajn aĵojn. Sed neniu en tiu urbo sciis pri ili. Pro tio ni nun diras, ke la policistoj en Portugalio estas ŝtelistoj.

Fritz Bergman (15 650).



Ĉeeste kun grandaj spiritoj

Kion ci heredis de ciaj antaŭuloj, tion ci akiru por ĝin posedi.

Geŭte (Goethe).



Doni sian maksimumon da penado en ĉi tiu mondo, tio estas atingi la celon de la vivo.

Pasteŭr.



La nura fakto, ke la mondo ekzistas, pruvas, ke ĝi estas neracia.

Emilo Mejerson.



La senpoveco de Dio estas senlima.

Anatol Frans (A. France).



Ni jam havas sufiĉe da devoj, kial do imagi devojn al dio, kiu ne ekzistas?

A. Frans.



Ni dubu, kredante; — ni kredu, dubante.

A. Frans.

LA KALEJDOSKOPO DE L'VIVO

Rolŝanĝo

Antaŭ tridek jaroj sinjorino Anjo Beznt *(Annie Besant),* la prezidantino de l' Teozofa Societo, kies sidejo estas en Adiar (Hindio), faris netakseblan eltrovon. Ŝi malkovris, ke la filo de ŝia ĝardenisto, kvar- aŭ kvinjara knabo, estis neniu alia ol la propra rekarniĝo de Budho. Post tiu konstato la knabo estis edukata por ludi la rolon de estonta Mesio.



KRIŜNAMURTI

Kiam li atingos 30 jarojn, antaŭdiris s-ino Beznt, li plene disvolvos sian Budho-karakteron. Intertempe la junulo, sub la nomo *Kriŝnamurti,* vivis senzorge k bonege en mezo de sennombraj fervoregaj adorantinoj. En Anglio oni elmontris lin triumfe, atendante grandajn miraklojn.

Nenio okazis . . . krom, ke la junulo, tedata eble pro la abstinado k aliaj puritanaj limigoj, ekforkuris al Holiŭud *(Hollywood,* la usona filmurbo), kie li film-aktoras. Certe li havos sukceson en sia nova rolo. Sed s-ino Beznt . . . serĉas kuraĝe novan Mesion, kiun ŝi ja sendube trovos sen peno.

La pilgrimado al Lurd (Lourdes) en 1929

El ĉiuj landoj de la mondo ĉiujare piaj katolikoj pilgrimas al Lurd (en Suda Francio). Inter ili troviĝas multaj malsanuloj, kiuj esperas tiele povi forpasigi siajn dolorojn. Karavane venis al Lurd per specialaj vagonaroj en 1929 242 405 sanaj personoj, k kun ili venis 15 681 malsanuloj (en 1928 estis 45 000 malpli da pilgrimantoj). Krome venis 412 000 izole pilgrimintaj personoj. Do sume estis en 1929 654 405 pilgrimintaj personoj. La ceremoniojn prezidis 5 kardinaloj, 26 ĉefepiskopoj, 100 episkopoj.

Laŭ "Espero Katolika".

4201
ekzemplerojn

de n-o 295 ekspedis la Administracio! La abonantaro **kreskas,** kvankam ne rapide.

Gek-doj!

Ni estas sur la bona vojo. Estas via tasko daŭrigi la tiom sukcese komencitan varbadon, disvastigi, konigi k abonigi nian "S-ulon" kun senlaca fervoro, por ke ni povu anonci post ne tre longa tempo la nombron

5000!

El usona taglibro

Je 26-a de marto

Dum 6 monatoj k 18 tagoj la Senato diskutas, diskutadas la imposttarifon. Preskaŭ ĉiu envenanta varo pli alte impostiĝis. La detalita tarifaro plenigis 2¼ grandajn paĝojn en la "New York Times" (Novjorka Tempo). Sed la pli saĝaj kapitalistoj (ekz. Oŭn D. Jang [*Owen D. Young*] k. a.) jam deklaras, ke Usono devas ŝanĝi la sintenon k alpreni pli internacian vidpunkton rilate al komerco. En februaro la komerco falis ĝis la punkto de februaro 1923. La ĵurnaloj antaŭvidas kontraŭatakon de aliaj komercaj grupoj alilandaj. Jam Francio venĝe por imposto kontraŭ sia punto multe altigas la imposton kontraŭ la usonan aŭton k proponas forpreni 52% el la profito, kiun gajnas la usona firmo funkcianta en Francio.

*

Ĉu senlaboreco, ĉu krizo, ĉu prezofalo aŭ prez-altiĝo, la tendenco de unuiĝo inter la grandegaj korporacioj daŭras. Nun per giganta kunigo, Novjorko povas fine fanfaroni, ke ĝi posedas la plej grandan bankon en la tuta mondo.

*

Notinde estas, ke la verkon *Standards* de Dubreŭj (france: *Dubreuil*)

LA EVOLUO SEN DIO

(Daŭrigo. Vidu n-ojn 293/95.)

La "mankantaj ĉeneroj"

La fosaĵo inter la homo k la simio estas superplenigita per fosilioj, el kiuj jenaj la plej gravaj, laŭ la vico de ilia malkovriĝo:

1856: La homo de Neandertal.

1891: La homo de Java aŭ *Pithecanthropus Erectus,* tiele duonvoje, ke la scienculoj demandis sin, ĉu ĝi estis homo aŭ simio.

1907: La homo de Hajdelberg (*Heidelberg*).

1911: La homo de Piltdoŭn (*Piltdown*).

1924: La kranio de Tongs *(Taungs)* aŭ *Aŭstralopithecus Africanus,* malkovrita dekkvin metrojn sub tero en Suda Afriko.

Ne ekzistas mankantaj ĉeneroj[1].

La natura selekto

La natura selekto, la granda teorio de l' Deveno, nombras kvin faktorojn:

1. VARIO: ne ekzistas du plantoj aŭ animaloj, kiuj estas absolute samaj.

2. SUPERFLUO: naskiĝas *pli* da organismoj ol povas postvivi. Kiel Maltus rimarkigis, la animaloj multobliĝas laŭ la progresio 2, 4, 8, 16, dum la nutraĵo kreskas laŭ la progresio 2, 4, 6, 8.

3. BATALO PRO L' EKZISTO: tute evidenta.

4. POSTVIVO DE L' PLEJ TAŬGAJ: Dum la batalo por la nutro k la loko la plej malfortaj estas forpuŝataj, la plej taŭgaj postvivas. La naturo eliminas tiujn, kiuj ne adaptiĝas al sia medio; estas la adaptiĝintoj aŭ plej taŭgaj, kiuj postvivas.

5. HEREDO DE L' FAVORAJ VARIOJ: Se individuoj atingas sian maturon sekve de favora vario, tiuj el inter iliaj posteuloj, kiuj reproduktas ĝin pli multe, vivos por daŭrigi la rason. Daŭrante tiu ĉi procezo de natura selekto estigas tiajn diferencojn en la strukturo k la funkciado, ke la formoj, kiuj rezultas de ĝi, povas esti konsiderataj kiel novaj specoj, k fine, novaj superaj grupoj.

Kia ajn estu la kaŭzo de l' vario, estas la natura selekto, kiu determinas la postvivon.

La propramova generado

La propramova generado estas esenca kondiĉo de l' Evoluo.

"Se la hipotezo de l' evoluo estas vera, la vivanta materio devas havi kiel originon la ne vivantan materion, ĉar, laŭ tiu ĉi sama hipotezo, la kondiĉo de l' terglobo estis tia en donita momento, ke la vivanta materio ne povus tie ekzisti, ĉar la vivo estis absolute neakordigebla kun la gasa stato." (Höksle — Huxley.)

---

[1] Oni legas en la *Merkuro de Francio,* n-o de 1. julio 1929: "Freŝdate s-o Georgo Montodon *(Montaudon)* komunikis al la Scienca Akademio sensacian novaĵon: s-o de Loys *(Lojs)* dum ekspedicio al Venezuelo laŭdire renkontis novan specon de homsimila simio. Oni scias, ke la simioj dividiĝas en du grandajn grupojn: tiuj de l' malnova kontinento kaj tiuj de l' nova kontinento; la homsimilaj (gorilo, ŝimpanzo, orangutango, gibono) apartenas al la unua. La nova k granda speco simia estus sekve la unua de l' nova kontinento. S-o de Lojs trakuris la arbarojn de l' supra parto de la rivero Kotatumbo. Li aŭdis bruon en la arboj; frapis lin aŭdi, ke la bruo ne venis de l' supro, kiel ĉiam estas kiam temas pri la simioj de tiu lando. Subite li vidis antaŭeniĝi du estaĵojn, kiujn li kredis ursoj; ĉi tiuj estis en stato de ekstrema furiozo, kriantaj, gestantaj, rompantaj branĉojn k ilin manipulantaj kiel armilojn, "ekskrementantaj en siajn manojn k ĵetantaj tiujn ekskrementojn kontraŭ la homojn". La ino estis mortigata k fotografata; ŝi havis proksimume 1,50 m. La aspekto estis homsimila, pli ol tiu de iu el la homsimilaj simioj de l' Malnova Mondo. S-o Montodon, kiu estas juna antropoido tre serioza nomis tiun ĉi novan parencon de l' homo *Ameranthropoides Loysi*". (Tiu simio ne posedis vostan alpendaĵon.)

tradukis anglen la *Taylor-Societo Usona.* La recenzistoj citas la laŭdojn pri usona industrio, per kiuj Dubreŭj intencas influi la francajn kapitalistojn pagi pli bonajn salajrojn k pli bone administri siajn entreprenojn. Certe ĝi estas iom utopia bildo el vidpunkto de kredema metiisto. *488.*

MINUTOJ EL MIA VIVO

Mi laboras la tutan tagon kiel multaj aliaj sovetianoj en laborejo, klubo, I. R. H., liberpensula k komjunula ĉeloj. Tamen ion apartan en mia vivo prezentas la laboro por esperanto k internacia edukado.

Akirinte esperanton mi kvazaŭ trovis la mankintan ĉe mi senton de sennacieco k kvazaŭ perdis la eblon esti nomata per plej malpuraj k malnoblaj atestoj kiel naciisto aŭ ŝovinisto.



Mi ĝojas, ke mi estas preskaŭ de komenco trasentinta la eknaskiĝon de laborista sennacieca organizo je nomo de SAT. Mi ĝojas pri sukcesoj de esperanto en medioj de tutmonda proletaro. Dum minutoj, kiam mi legas "S-ulo"n, leterojn, esp. literaturon aŭ kiam mi skribas k multon pensas, — mi ofte sentas min fortega, miaj pulmoj k mia koro plej intense komencas funkcii, okuloj plene malfermitaj komencas brilegi k manoj pugniĝas. En tiuj minutoj mi volas kriegi al la tuta mondo: "K-doj, ni jam estas liberaj de lingvobaroj, de naciismo, la mondo ŝajnas al ni jam preskaŭ malvasta, ni sentas nin anoj de unu tutmonda laborfamilio."

Sed tuj post tiu sento la fulmo-penso aliĝas al mi la mondon — mi vidas ĝin kiel aron da sklavoj devigitaj ne pensi, sed plenumadi la volon de kelkaj krimuloj — militistoj k kapitalistoj; kiel aron da bestoj aparte enkaĝigitaj: tiam mi plej ofte severege batas la tablon per pugno k certe post tiu sencela frapego mia mano rifuzas kelktempon labori. Mi tamen opinias, ke tio estas bona ekzercado por niaj pugnoj; ni sciu, ke veraj proletoj, kiuj ĉion akiras per siaj manoj k pugnoj, baldaŭ ankaŭ akiros per la samaj manoj por si Liberon!

A. Semjonov (7113), Kremenĉug.



PRIMILITAJ PENSOJ

Ĉiutage en la gazetoj oni povas legi artikolojn pri la venonta milito. Ĉiuj pritraktas la manieron uzotan por buĉi aŭ veneni nin, sed neniu alportas konkludojn. La artikolo "La estonta militarmilo" en n-o 281 igas min diri mian opinion pri tiu gravega temo. Ni havos denove militojn, ĉar la homoj ĝenerale estas patriotaj k fidas sian registaron. Sekve la saĝaj homoj sentas sin malkapablaj eviti novan katastrofon tiom longe, kiom daŭros la kapitalismo. Plie, ŝajnas, ke la lasta milito ne estis moralinstruo eĉ por la kleruloj.

Mi ĵus legis rezulton pri enketo farita de iu Pariza klubo "Le Faubourg" (La Antaŭurbo) ĉe germanaj verkistoj pri la demando: Se nova milito okazus, ĉu la germanaj militintoj denove "marŝus"? Arnold Reĥberg (Rechberg) respondis: "Kiel mi konas la germanan popolon, mi estas firme konvinkita, ke ĉiuj militintoj "marŝus" unuanime k kontraŭ kiujn ajn, se nova milito okazus".

Remark (Remarque), la aŭtoro de "En okcidento nenio nova" diras je la fino de sia respondo: "Se malamikaj armeoj invadus hodiaŭ Vestfalion, mi estus morgaŭ denove soldato. Mi estas pacema homo . . . ne pacifisto". Feliĉe, ke ekzistas homoj kiel Ajnŝtajn (Einstein) en Germanio, kiuj rezonas aliel! —

En Francio, ĉe multaj la afero estus sama. La homoj, kiuj ege suferis dum la milito, ne ĝojus rekomenci, k certe okazus ribeloj, sed la junularo stultigata de la gazetaro, kino k precipe oficiala sporto, konsentus partopreni la hombuĉadon.

Mi opinias, ke ne ekzistas rimedo por savi la novajn generaciojn per la nuntempa edukado. Por malebligi militojn, ni jam devus tuj malpermesi al la infanoj legi la historiajn lernolibrojn, kiuj estas danĝeraj mensogaroj, forbruligi ĉiujn primilitajn verkojn, balai la statuojn de la banditoj, kiuj komandis la armeojn, kiuj kvazaŭ insultas nin sur la publikaj placoj, detrui la militpentraĵojn en la muzeoj, kiuj gloras la murdon, k konsideri la soldatojn mem kiel malbonfarulojn. *Marso.*

"Se estus eble al mi povi etendi mian rigardon trans la abismojn de l' geologiaj epokoj, ĝis la periodo ankoraŭ pli malantaŭa, dum kiu la tero trapasis kemiajn kaj fizikajn kondiĉojn, kiujn ĝi ne plu revidos — ne pli kiel estus eble al la homo revivi sian infanecon — mi atendus esti la atestanto de l' evoluo de l' vivanta protoplasmo el la nevivanta materio" (Tindal/*Tyndall*). "La Evoluo estas teorio, kiu entenas, ke ne nur la malsuperaj formoj de la animala vivo — ne nur la noblaj formoj de l' ĉevalo k de l' leono — ne nur la mirinda mekanismo de l' homa korpo — sed ke la animo mem: emocio, inteligento, volo — estis iam en latenta stato en fajropluvego. Ĉio, kio konsistigas nian filozofion, nian sciencon, nian arton, estis iĝebla en la sunardegoj" (Tindal).

La sinteza kemio akiris substancojn, kiujn oni kredis povi esti produktitaj nur per la viv-aktiveco de plantoj k bestoj — la alkoholo, ekzemple. La kreo de l' vivo per la kemiistoj en eksperimentejo ne kaŭzus eksterordinaran surprizon. Oni atendas ĝin.

(Daŭrigota.)

Karlo Smith.

El la franclingva revuo "L' en dehors" tradukis N. B.

DISKUTEJO

Iom pri "Tagoj el mia vivo"

En "S-ulo" oni jam esprimis opinion, ke "Tagoj" fariĝas unutonaj, similaj, preskaŭ samenhavaj[1]. Oni faris proponon loki en "S-ulo" nur "eksterordinarajn tagojn". Tia propono ankaŭ estas interesa. Sed mi deziras proponi iom alian. Niaj ĉiulandaj gvidantaj Gek-doj, kiuj estas preskaŭ ĉiuj malnovaj k spertaj esperantistoj, verku, aŭ simplan aŭ eksterordinaran "tagon el sia vivo". Mi ekzemple kun granda plezuro legis "eksterordinaran tagon" de nia K-do Mark Starr (488) el Londono. Tiuj niaj gvidantaj Gekdoj montru, kion ili sukcesis akiri per esperanto, kiel ili plej fruktodone uzas tiel "karan" tempon, tage okupante sin per panakira laboro k vespere tre aktive partoprenante esperantan movadon, ĉu tradukante, legante aŭ verkante ion, ĉu lekciante, ĉu instruante, ĉu redaktante ian gazeton ktp. Ili montru tion por ni simplaj K-doj, kiuj ankoraŭ ne havas tiel bone disvolviĝintan intelekton, por ke ni povu ĉiam racie uzi la tempon k ripozon, samtempe aktive partoprenante nian movadon. Se tia propono estos subtenata de niaj K-doj k ĝi efektiviĝus internaciskale, t. e. ke ĝin partoprenos Gek-doj el ĉiuj landoj, ni akiros tre grandan sperton k utilon tiurilate, ni konatiĝos kun vivo de proletaj Gek-doj intelekte pli disvolviĝintaj ol tuta amaso k samtempe ni havos parton da materialo por historio de laborista esp. movado. Komenco tiuflanke jam estas farita de K-do Mark Starr, mi invitas sekvi lian ekzemplon, niajn plej aktivajn gvidantojn.

Vjaĉeslav V. Kalaŝnikov (1125), Niŝni-Novgorod.

Esperanto-Servo

N-o 36 — 4-a jaro Gvidanto k kompilanto: O. BÄSSLER, Ebermayer-Str. 8, I, Leipzig C 1 (Germ.) 5. Junio 1930

EL AŬSTRALIO

Eltiraĵoj el esp-a letero[1]

253 (Esp.-Servo.) ... Mi laboris en diversaj laborejoj k post longa senlaboreco mi sekvis mian patron k fariĝis policano en Melburno. En la jaro 1923 mi partoprenis kun 635 K-doj policanoj la policanan strikon (ribelon); la registaro maldungis nin k neniam redungos nin — tion oni diris. Pliposte, dum la regado de la "provizora laborista registaro" oni redungis multajn en aliaj ŝtat-fakoj. Mi tiam fariĝis mallibereja gardisto ĉe Pentridge (Pentriĝ), kiu estas unu el modelaj malliberejoj en la mondo (laŭ humanismo) sub kapitalismo ... Nia fakestro estis lerneja inspektoro, li faras multon por eduki la gardistojn pri humanaj metodoj k ankaŭ pri moderna psikologio. Certe la plimulto de malliberuloj aŭ preskaŭ ĉiuj estas senutiluloj — viktimoj de l' kapitalismo, k ankaŭ plejparte kontraŭuloj de la laborista movado. Spite ĉi ĉio mi atendas la tagon, kiam ni ne bezonos malliberejojn — sed tiu stato ne estas ebla sub kapitalismo ...

Nun iom pri Aŭstralio. Koburg (loĝloko de la skribinto — la ES-kompilanto) estas ĉirkaŭurbo de Melburno. Melburno havas 1 018 200 loĝantojn, pli ol ½ de la loĝantoj en Viktorio. Aŭstralio havas ĉ. 6½ milionojn da loĝantoj. La klimato estas la sama kiel en Sud-Francio k Italio. Preskaŭ ⅓ de Aŭstralio situas en tropika regiono. Dum vintro (julio, aŭgusto, septembro) multaj montoj estas neĝ-kovrataj. Ekzistas en Aŭstralio proks. 60 000 nigruloj-indiĝenoj k 15 000 duon-nigruloj (pro interedziĝo de blankuloj k nigruloj). Proks. 13 000 estas nomadoj k ankoraŭ loĝas en la enlando k norda Aŭstralio sub primitivaj vivcirkonstancoj de ŝtonepoko, uzante la fajreran bastonon (por komenci fajron), la lignan lancon, ŝton-tranĉilon k la ŝton-hakileton — ankaŭ la bastonegon. La resto de la indiĝenoj (nigruloj) estas dungataj ĉe la ŝafaraj k brutaraj farmoj (preskaŭ kiel sklavoj), aŭ ili loĝas en ŝtataj institucioj kie ili ricevas edukadon ... En la nordaj regionoj ili dum la tuta jaro estas tute senvestaj. En la sudaj regionoj ili dum vintro sinvestas per feloj de makropoj, aŭstraliaj didelfoj k aliaj bestoj. Pro enpenetro de civilizacio ili rapide formortas ...

Labor- k viv-kondiĉoj. La meza salajro en Aŭstralio estas ĉ. 100 ŝilingoj anglaj (1 ŝ. estas ĉ. 1 mk. g.) po semajno; semajna labortempo 48-hora. La baza salajro (laŭleĝe pagenda al nelermintaj laboristoj) estas 90 ŝ. por 48-hora laborsemajno. Mia salajro estas 116 ŝ. po semajno 48-hora, 1 monaton kiel ferioj plenpagaj ĉiujare (kune kun ĉ. 12 apartaj publikaj festotagoj); mi ricevas 2 parojn da botoj jare k uniformon — ambaŭ senkoste. — *Kelkaj prezoj por necesaĵoj.* Lupago (4—5-ĉambraj domoj) estas 23 ŝ. semajne; la plej multaj familioj loĝas en domoj por si mem, la loĝeja problemo ne estas tiel akuta kiel en Eŭropo, sed ĝi pli k pli malboniĝas. 4 funtoj da pano kostas 11 pencojn (12 anglaj pencoj estas 1 angla ŝilingo); 1 funto da butero 22 p.; 1 funto da ŝafaĵo 6 p. k bovaĵo 12 p. Funto da teo kostas 2 ŝ. (24 p.) ĝis 30 p.; 1 funto da sukero 4½ p.; vira ĉapelo 15—30 ŝ.; virina ĉapelo 5—30 ŝ.; viraj botoj 15—30 ŝ.; virinaj ŝuoj 8—30 ŝ.; kompleta vestaĵo (ekstera) por virino 8—80 ŝ., por viro 80—160 ŝ. — Estas en Aŭstralio nuntempe pli ol *200 000 senlaboruloj,* kiu nombro konstante pliiĝas ...

Esp-a movado. Ĵus ni fondis en Koburgo laboristan esperanto-grupon ĉe la laborist-partiejo, kiu konsistas el ĉ. 20 anoj. Mi instruas esp-on; ĝi estas vigla grupo. Mi estas memlernanto, esperantiĝis en jaro 1927; krom la Koburgan grupon mi ankaŭ vizitas la esp-an grupon en Melburno, kiu konsistas el ĉ. 60 anoj (tre vigla grupo). Spite la izoleco estas en Aŭstralio multaj esp-istoj. Estas en Melburno alia grupo, kiu nombras ĉ 30—40 anoj, sed la unue nomata grupo estas la pli vigla ... SAT k SAT-aĵoj estas malpermesitaj en Aŭstralio; tamen ni ricevas multajn librojn ... *Koburg-ano.*

[1] Kvankam ĉi eltiraĵoj kvazaŭ "falas" el kadro de ĝisnuna "ES", ni trovis ilin sufiĉe legindaj k presigindaj ankaŭ en nacilingvoj. Samtempe plendantoj pro mallongeco de niaj raportoj estas iom kontentigitaj.

EL USONO

Pri "senarmigo" en Usono

254 (Esp.-Servo.) Dum la senarmiga konferenco daŭris en Londono, la usona parlamento debatis pri kelkaj leĝ-projektoj, kio bone ilustras la "Kellogg"-kontraktulojn. La marionetoj de la usona kapitalismo en kongreso klopodis fari leĝon, kiu ordonas studadon k raporton por leĝo, kiu devigus ĉiujn laboristojn labori sub kontrolo milit-departementa k disciplino militistara, kompreneble, en la fabrikoj de grandkapitalistoj por ilia profito. Dum la leĝprojekta fi-frazeologio pretendas "egaligi la ŝarĝojn k malgrandigi la profitojn elire de milito", ĝi vere nur permesus konskripcion de "laborpovo" — t. e. gelaboristoj. Sed eĉ ankaŭ en la usona parlamento estas unuopuloj, kiuj "kontraŭas al la plena forpreno de vivorajto k libereco". Tial kongresano Huddleston proponis aldonon al la leĝo, kiu tekstu: "kondiĉe ke la nomita stud-komisiono ne konsideru k ne raportu pri konskripcio de laborpovo". En la voĉdonado la aldono estis akceptita per nur tri-voĉa plimulto. Neniu postulis registradon de la nomoj de l' voĉdonintoj, ĉar per ĉi estus donota bonega politika propagandilo dum estontaj balot-kampanioj. Do, tiel sin preparas Usono por la "mondpaco". *INO-KOR 1307.*

Senkulpaj Money k Billings restas en pundomo

255 (Esp.-Servo.) Laŭ la ĉiutaga gazeto "The Record" la personoj, kiuj kaŭzis la eksplodon de bombo ĉe parado, 22. julio 1916 en San Francisko, k pro kio oni malliberigis la strikgvidantojn Tom Money k Warren Billings, estas konataj. Draper Hand, eksdetektivo, kiu servis sub polickapitano Duncan Mathieson de la bomba skadro ĝis post la maljusta kondamno de la bone konataj gvidantoj, diras tion. I. a. Hand diras, ke li trovis 40 personojn, kiuj insistis ke Money k lia edzino ĉeestis sur la tegmento de "Eiler's" konstruaĵo dum tempo de l' eksplodo. Ankaŭ fotoj montris ilin sur la tegmento k strata horloĝo sur la foto montris la tempon preskaŭ same kiel tiu de l' eksplodo. "Ĉi tiu alibio" — diras Hand — "estis sentrua k estas ankoraŭ". Du strikrompantoj aŭ fiagentoj estas la kulpuloj. Hand, laŭ la gazeto, havigis el ili "reciprokan konfeson" per elludado unu kontraŭ la alia. Ili fabrikis acidan tempbombon k intencis uzi ĝin sur ŝarĝboato uzata de strikrompantoj. Iliaj motivoj estis krei publikan opinion kontraŭ la strikantoj k impresi siajn dungintojn per la danĝero de l' laboro k tiel gajni plialtigon de salajroj. Ili ankaŭ iel esperis kolekti monon el la Unio. Survoje al la ŝarĝboato la densa amaso da homoj baris al ili la vojon al la boato, k ektimante la eksplodon de l' bombo ili formetis ĝin en skatolo sur trotuaron. Money k Billings estis kondamnitaj pro malveraj atestadoj en jaro 1917 k restas malliberuloj en ŝtata pundomo en Kalifornio, nomita San Quentin. Ŝajnas ke ilia sola krimo konsistas en tio, ke ili estis strikgvidantoj k lojalaj membroj de Laborista Unio. *16 285, Los Angeles.*

RESPONDA PARTO

Sendu informojn pri utiligebleco de ES-raportoj al la Centrejo de Esperanto-Servo (Leipzig), kiuj multe utilas al ni.

SENNACIULA SPORTA PAĜO

Kompilanto: Ad. Wendt, Leipzig O 27, Rudolph-Herrmann-Str. 7, ptr. r. (Germ.)

Problemo de gvidantara kontingento kaj kursoj "1000"

La organizitaj kursoj "1000" ĉe la Regna Instituto de Korpokulturo celas solvi grandskale la problemon por prepari la kontingenton da korpokulturaj laborantoj el la laborista aktivularo.

La kompletigo de la kursoj jam komenciĝis la 10-an de decembro lastjare. Pri ĉiuj kandidatoj al la kursoj oni diskutis dum ĝeneralaj laboristaj kunvenoj. Ĉiuj enirintaj en kursoj estis submetataj al detala antropometra, medicina k ginekologia (por virinoj) kontrolo. La materialoj de ĉi tiu kontrolo post prilaboriĝo donos riĉajn montrojn por karakterizo de profesioj k por konstruado de planoj, programoj k metodoj de okupoj ne sole en la kursoj, sed ankaŭ en rondetoj k metiejoj.

La organiza plano de la kursoj estas jena. La kursoj komenciĝis la 1-an de januaro k daŭros ĝis la 1-a de de julio k de la 1-a julio ĝis la 1-a de januaro 1931. La lerna plano de la kursoj konsistas el 288 horoj, el ili estas 100 horoj lekciaj k 188 horoj praktikaj. La okupoj okazas dufoje dum kvintago de la 18-a horo ĝis la 22-a vespere.

Fundamenta bazo de la programo teoria estas: universaluloj k sekciuloj — socia scio k aktuala politiko, militaj scioj, organizado k gvidado de korpokultura laboro, Ruĝa Sportintern k internacia sportmovado, popolaj komisarioj, profesiaj unuiĝoj, kluboj, anatom-biologia kontrolo, teorio k ĝenerala metodo de korpokulturo, higieno ĝenerala, profesia k korpokultura, la unua helpo, sportmasaĝo, memmasaĝo. Krom tio la universaluloj konatiĝas kun metodo de fundamentaj korpokulturaj specoj — gimnastiko, movaj k sportaj ludoj, sporto (skioj, glitiloj, lukto, levo de pezoj, dromsporto (malpeza atletiko), naĝo k remado.

Sekciuloj konatiĝas krom kun la fundamenta programo kun unu speco de somera k unu speco de vintra sportoj.

Nuntempe estas organizitaj kvin sekciaj grupoj — du gimnastikaj (vira k virina), unu skia k dromsporta (malpezatletika — lukto, bokso, levo de pezoj) unu sportluda (piedpilko, hokeo, volejpilko, korbpilko k manpilko). Metodo de teoriaj lernobjektoj estas vigla interparolo, atentigo de kursanoj per demandoj, praktikaj montroj. Prilaborado de lernobjektoj okazas kun ĉiu grupo aparte. Praktiko estas ekzercata en halo, sur glitilejo, skioj k estas akompanata per klarigoj teknikaj k metodaj.

En plua kursa disvolvo estas intencata organizi apartan grupon el la plej sukcesintaj kursanoj por ilia preparo al la alta korpokultura lernejo.

Malgraŭ vico da malhelpoj, tiu tasko estos plenumita, k ĝi sendube sanigos la korpkulturan laboron.

El "Korpokulturo k Sporto" n-o 15 esperantigis *A. Lebedev, Tver.*



Ankaŭ knabinoj volonte ludas per puŝpilko

PREPARA SEMAJNO POR LA 2. OLIMPIO LABORISTA

okazos de la 14.—18. aŭgusto 1930 en Lieĝo (Belgio) en la kadro de granda internacia ekspozicio. La preparado de la festo kuŝas en la manoj de nia K-do Julio Devlieger. La festo, kiu ankaŭ estos vizitata de multaj eksterlandaj delegitaroj (el Francio, Svisio. Germanio, Aŭstrio ktp.) certe grave antaŭenpuŝos la lab. sportmovadon en Belgio k najbaraj okcidenteŭropaj landoj. Prezentataj estos ĉiuj sportspecoj: gimnasto, gimnastiko, atletiko, dromsporto, piedpilko, manpilko, naĝo k biciklado. Ĉar la festo okazos post finiĝo de la X. SAT-kongreso en Londono, certe ankaŭ multaj SAT-anoj profitos la okazon, por subteni la agitadon de niaj belgiaj sportfratoj. Konsilinde tial estas, ke oni anoncu sian partoprenon sufiĉe frue al la gvidanto de la festo, K-do Julio Devlieger, *Fléron* (Belgio). Partoprenontoj, kiuj deziras jam nun korespondi kun belgiaj sportuloj skribu al: *Muŝiĥ*, Quai de Derivation 14, *Lieĝo* (Belgio).

Je la 26. k 27. julio okazos en Dresden asoci-festo de la laboristaj bicikluloj germaniaj. Esperantistoj el najbaraj landoj, partoprenu!

Laborista sporto en Pärnu (Estonio)

La laborista sporto en Pärnu dormis ĝis nun en ŝajnmorto.

Vintre estis granda konkurso kun la Tallinnanoj (Tallinn estas la metropolo de Estonio), kaj la Pärnuanoj venkis sur la tuta fronto: Ping-Pengo, korbopilko (Basket-ball), retpilko (Volley-ball), bokso ktp. —

La 11-an de Majo la laborista societo en Pärnu (estone: Pärnu Tööliste Ühing) aranĝis grandan printempan kuron tra la urbo (ĉirkaŭ 4 km.). Partoprenantoj estis 12. Ĉiuj finis la kuron, kaj la unuaj tri venkantoj ricevis valorajn premiojn. —

Sportanto, Pärnu.

Skribu esperantlingve

Laborista Gimnast- k Sportasocio de Germanio plendas, ke en lasta tempo ofte okazis, ke niaj germanaj K-doj skribis al la citita asocio esperantlingve, kvankam ili nur loĝas 30 minutojn for de la asocia sidloko. Ni do avertas niajn K-dojn, ke ili ne uzu esperanton, korespondante kun sia nacia sportorganizo, sed nur en la korespondado kun eksterlanda fratorganizo, kies lingvo estas malsama al ilia gepatra lingvo. Ni ja ne uzas esperanton por malfaciligi la laboron de niaj organizoj.

Do: alilingvanoj skribu esperantlingve!

2518.

SPORTULOJ! Raportu pri vialandaj sport-asocioj. Nia paĝo respegulu la vivon k agadon en ĉiuj landoj!

TRA ESPERANTIO

ESPERANTO ESTAS DANĜERA POR LA BURĜARO DE HUNGARIO

Eble la unuan fojon okazas en Esperantio, ke esp-o iĝas tiom danĝera por burĝoj, ke ili ekmovas eĉ la brulŝtiparon kontraŭ ĝia preso. Antaŭnelonge okazis al K-do en Miskolcz, ke la polico lin punis per du semajnoj da enkarcerigo pro propagando de esp-o k ĉian havaĵon de la tiea grupo ĝi forbruligis.

Kaj nun sekvis alia paŝo. Antaŭ du jaroj eldonis HESL[1] malgrandan kantlibreton kun titolo, "Ni Kantu". Plej grandparte popolkantojn ĝi entenis, nur kelkajn laboristajn. Tamen ĝin opiniis danĝera por la nuna sociordo la juĝistaro "sendependa" k ekprocesis kontraŭ ĝia respondeca eldonanto. K-do Bleier "ne memoris" la tradukintojn k tiel sekvis la laŭgrada respondeco. Motivo: unu kanto enhavas kontraŭklasan inciton k en ĉ. 16 vicoj agas kontraŭ eĉ du paragrafoj de la nova eksterordinara kodo. Malgraŭ ke ĉiuj kantoj troveblaj en la kajero, eĉ la persekutita, aperis en hungara lingvo, en Hungario mem — kion la prokuroro ne povis refuti — la juĝistaro opiniis, ke la traduko devas esti juĝata kiel tute memstara verko k se ne troviĝas verkisto, tiam devas esti eĉ nur formale, prijuĝata la presisto. Jen la kanto:

Se hejmen post batal'
Vin portas laca paŝ'
Atendas tie vin mizer' k malpuraĵ'.
Dum bleke ploras la infan', ke mankas panopec'
Miloj vivas en palac' en rida senfarec'.

Pugnobato, pulvokrak'
For mizero k malsat'.
Forlavu ilin kiel flu'
K proletar' ne estos plu.

Ekkaptu proletar', martelon por batal'.
Pereu de la ter' la band' de l' kapital'.
Sufokas ĝia brako vin, heziti estas hont'!
Disrompu rustajn ĉenojn k vi regos en la mond'.

Kaj pro tiuj vicoj, kiujn kantis, eĉ laŭ la konsidero de l' juĝistaro nur kelkdekoj da homoj en Hungario, la juĝistaro trovis juste puni la respondecan eldonanton per unumonata enkarcerigo, pago de la proceskostoj k la resta kvanto de la libro devas esti konfiskata . . .

La societo havas plenan paperujon da decidoj de l' hungaraj etreĝoj, kiuj eltrovas la plej fantaziajn motivojn por malpermesi kurson aŭ grupfondon. Ĉe ni ja estas kaŝa diktaturo k tial estas bezonataj tiuj paperaĉoj. Se ie — precipe inter terkulturistoj — ni volas aranĝi kurson, ne nur raporti ni devas, sed se oni donis permeson, ĉeestas policistoj, multfoje armitaj ĝendarmoj, kiuj kontrolas, ĉu fakte nur esp-on oni instruas. Estas imageble, kiel bonhumoro povas regi en la kurso . . . La peresp-a laboro estas ege malfaciligita.

Ekzemple iu etreĝo malpermesis kurson, motivante ĝin jene:

"Estas timinde, ke per esp-o la laboristoj havos interrilaton kun eksterlandaj laboristoj". Ha . . . ha . . . ha . . . sendube ni lernas esp-on, por ke ni hungaroj interrilatu inter ni! Sed ja ankaŭ tion diris iam policisto, ke "por vi estas ja facile, vi povas ĉion paroli esp-e inter vi malantaŭ la dorso de la polico k ni ne povas kontroli. Tial do estas necesa laŭ vi esp-o por la laboristoj, ĉu ne?"

Sed ĉiuj ĉi decidoj havas ankaŭ bonan flankon. Montras klare, al ĉiuj laboristoj, ke esp-on ni devas uzi por klasaj interesoj de la laboristaro k tiel nenian komunon ni povas havi kun burĝaj esp-istoj. Vidu, ankaŭ ili pensas same. Nome de jaroj estas raportisto de "Heroldo de Esperanto" sinjoro P. B. En la lastaj artikoloj li trovas lokon pri ĉiuj hungaraj novaĵoj, pri jubileo de Horti (*Horthy*), pri ĉikanoj, pri ĉio, nur pri tio ne, ke la laboristoj malsatas, malgraŭ polica malpermeso festis la 1-an de majo, ke la senlaborula amaso kreskegas, ke esp. movado estas persekutata, se ne gvidata de pastroj . . . kvankam la sinjoro estas tre fervora k tre, tre "neŭtrala" esp-isto k ankaŭ orda raportisto.

Kaj malgraŭ ĉiu perforto validas la proverbo "La hundo bojas, la karavano marŝas". *2828.*

[1] Hungara Societo Esp. Lab.

PRI NIA PROJEKTO DE AFIŜO

Sekve de nia alvoko en la n-o 290 de "S-ulo" jam 6 K-doj skribis al ni por peti klarigojn k precizigojn. Ni povas nur ripeti, ke temas verki bildon, kiu komprenigu per viva maniero al homoj el Berlino, Moskvo, Novjorko, Pekino, Tokio ktp. la gravan signifon de esperanto k de ĝia aplikilo: SAT.

Temas evidentigi, ke la Proletaro povos definitive emancipiĝi k akiri altnivelan vivstaton, nur se ĝi estas tutmonde unuiĝinta; nur se la naturaj riĉoj el la tuta tero estas racie ekspluatataj k egale dispartigataj inter ĉiuj laboruloj.

Temas komprenigi, ke tia unuiĝo estas ebla nur se forestos lingvaj baroj inter la homoj. Esperanto estas tiu racia k perfekta ilo, kiu detruas tiujn lingvajn barojn, k SAT estas la aparato, kiu aplikas praktike la ilon; SAT estas la embrio de alcelata socio sen naciaj limoj; ĝi montras la vojon al la samcelaj laboristaj organizoj, kiuj ankoraŭ baraktas en la granda konfuzo de nekompreniĝo inter la proletoj.

Ĉu estas eble bildigi tiajn ideojn? Ni ne scias. Se ni scius, ni provus mem verki la afiŝon. Ni estas konvinkitaj, ke nia projekto havas ŝancon sukcesi, nur se la afiŝo estas vera artaĵo originala k facile komprenebla por homoj el ĉiuj mondpartoj.

La vorto ESPERANTO kompreneble elstaru nepre sur la bildo, k ankaŭ la titolo de nia asocio: S e n n a c i e c a A s o c i o T u t m o n d a (SAT).

Kompreneble, la nacilingva teksto algluenda k kiu surhavos nomon k adreson de loka grupo aŭ de nacilingva LEA, povos ankaŭ enteni mallongan klarigon pri la signifo de la bildo; sed tio estas duonefika rimedo: La afiŝo devas p a r o l i al la okuloj. Ĝi estu trikolora, k ĝia formato 43×55 cm k ties duoblo: 86×110 cm. (La unua nombro indikas la larĝon, la dua la alton.)

DIREKCIO DE SAT.

A t e n t i g o ! K-doj metu sur siaj leteroj al la Redakcio ĉiam siajn nomon k adreson!

Proletaria Kantaro

La elekto de la kantoj, ilia proleta tendenco, ilia internacia valoro, la fakto, ke ĉiu povas studi kaj kanti ilin dank' al la muziknotoj zorge presitaj, faras el tiu volumo unikan verkon, kiaspeca ne ekzistas ĝis nun en iu nacia lingvo.

Prezo: 2,50 mk. g.

Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27

ĈIRKAŬ LA X-a KONGRESO

Internacia Laborista Universitato!

La scienckultura sekcio de SAT decidis dum la kongreso en Leipzig, laŭeble dum ĉiu estonta SAT-kongreso okazigi ciklon de lekcioj pri aktualaj temoj de mondkoncepto k klasbatalo. Tiel ni konforme al la kulturaj edukaj taskoj de SAT akcelos la plikleriĝon de la membraro. La unua provo estis la internacia proleta altlernejo, kiu kontentige funkciis dum la pasintjara kongreso. Por la nunjara kongreso en Londono ni same planas aranĝon de 8 lekcioj de niaj fakulaj K-doj.

Ni insiste petas ĉiujn K-dojn, kiuj ĉeestos la kongreson en Londono k kapablas lekcii pri laŭplaĉa sociologia, mondlingva aŭ scienca temo interrilati baldaŭ kun la sekretario de la sekcio. La sekcia estraro proponas al la parolontoj elekti unu el la subaj temoj, sed ankaŭ aliaj temoj estos volonte akceptataj. La lekcioj daŭros po 1½ horoj. La dato k tempo estos fiksata en la kongresprogramo post anonciĝo de la parolontaj Gek-doj.

Helpu al la funkciado de Internacia Laborista Esperanta Universitato!

Proponataj temoj

Sociologio. 1. (Ciklo: Elementoj de marksismo): Teorio de historia materialismo. 2. Imperialismo k militoj. 3. La kvinjarplano de socialisma konstruado en Sovetio. 4. Artoj kiel esprimo de sociaj bataloj. 5. Proleta k burĝa justeco k moralo. 6. La raciigo ĉe burĝaro k ĉe proletaro. 7. La virinoj en sociaj movadoj de estinto k estanto. 8. Ateismo k religio.

Mondlingvo. 9. (Ciklo: Moderna lingvoscienco): Jafetida teorio de Marr.

Naturscienco k medicino. 10. Moderna fiziko pri energio k materio. 11. La ĥemio de la universo. 12. Seksa problemo k la proletaro.

Aliaj temoj. 13. Laborista sporto k sano. 14. (Ciklo: Nia planedo): Britio — Lando, ekonomio, laborista movado. La anonciĝantaj K-doj bonvolu aldoni mallongan tezaron de sia prelego.

La Scienckultura Sekcio
F. Wolff (13 058), D. Snejko (603), H. Muravkin (2921).
Sekretario: H. Muravkin, *Berlin W 50,* Fürtherstr. 11a/3 (Germanio).

Komuniko al SAT-anoj kongresontaj

La Brusela SAT-rondo organizos okaze de la X. SAT-kongreso *antaŭkongreson* en *Bruselo* (Bruxelles). Propagandkunvenoj k renkontiĝoj okazos la 31-an de julio k 1-an de aŭgusto. La K-doj, kiuj deziras pasigi unu aŭ du tagojn en Bruselo, sin anoncu kiel eble plej baldaŭ. Adreso: Jos. Lebacq, 17, Rue du Poinçon, *Bruxelles* (Belgio).

Ĉu ni ludos la "Lignovermon" en Londono?

En Novjorko ni prezentis kun granda sukceso la klasbatal-tendencan teatraĵon "La Lignovermo" (tradukitan el germana lingvo). Temas en ĝi pri "laborej-gazeta" propagando en meblofarejo. Jam ni interrilatis kun K-doj en Leeds (Britio), la Organiza Komitato de l' X-a k la Direkcio de SAT. Ni estas pretaj multobligi la tradukaĵon k sendi po 1 ekzemplero al du aŭ tri K-doj, kiuj sin anoncus kiel kunaktoroj-volontuloj. Lernado devus tuj komenciĝi pro mallonga tempo, kiu restas; antaŭ alveno Londonon la rolo devus esti finstudita. *Roloj:* Majstro en meblofarejo (ludonto trovita), fabrikposedanto, balaistino, fabrikspiono, kapitalista altrangulo (riĉa industriisto titolita), laboreja konsilanto (laborist-delegito), metilernanto (14—16-jara aŭ pli juna), du meblistoj.

Kiu el la kongresontoj anoncos sin kiel kunludonto? Ne prokrastu skribi al:

Th. Weder (1307), kongresonto, 24—29, Merchant Str., *Astoria,* L. I., USA (Usono).

Esperanto ĉe socialista junularo en Francio

La 1-a kongreso de socialista junularo de *Jura,* kiu okazis je 11. 5. en Sankta Klaŭdo *(St. Claude),* akceptis rezolucion por tuja, praktika utiligo de esperanto, transdonitan al la estraro por efektivigo. (*Noto:* Tiun sciigon ni bedaŭrinde ne ricevis rekte de la K-do[j] iniciatinta[j] la decidon poresperantan, sed trovis ĝin — hazarde — en franclingva lab. gazeto! — *Red.*)

POST LA UNUA DE MAJO

Ni ricevis de pluraj K-doj el diversaj regionoj skribaĵojn spontane verkitajn sub la impresoj de l' unuamajaj okazoj en ilia loko, ilia regiono. Ili vortigis per tiuj linioj siajn sentojn, siajn pensojn k konsiderojn, kvazaŭ dezirante liberigi sin de ŝarĝo, kiu pezis sur ilia animo. Ni aŭdas iliajn parolojn pri la sento de feliĉo, pri la konscio de forto, kiam ili povis manifestacii kun la granda frataro de l' laboranta homaro en tiu festotago de l' Laboro; ni aŭdas ilin esprimi ankaŭ sian indignon pri hontinda indiferento de granda parto el la popolaj amasoj je tiu komuna festotago, pri la apatio k senkonscio de multaj laborfratoj. Sed precipe ni vidas ilin elstarigi en ĝusta lumo la gravan rolon, kiun esperanto estas destinita ludi kiel interfratiga faktoro, por fari el la festo de proleta solidaro ne nur simbolan manifestacion, sed realan plenumon.

Bedaŭrinde ni ne povas aperigi en "S-ulo" tiujn "impresojn" — ne, ĉar ili ne indus presiĝi, sed ĉar la malgrandaj k malmultaj paĝoj de nia gazeto tion ne permesas k la aktualo pri ili jam forestis, kiam ni ricevis ilin. La K-doj, kiuj sentis kvazaŭ nerezisteblan bezonon unuigi siajn pensojn k sentojn en k post tiu Tago kun tiuj de l' tutmonda Proletaro, per nia komuna esprimilo — esperanto, k resonigi ilin en nia unulingva organo, trovu rebrilon de tio, kion ili volis vortigi, en ĉi tiuj linioj. REDAKCIO.

EL NIA LETERARO

K-dino M. v. Essen (10 287), Nederlando, skribas:

"Ĵus ricevinte "S-ulo"-n mi miras pro la enhavo de l' recenzejo. Kial estas recenzitaj aŭ menciitaj *naci*lingvaj libroj aŭ broŝuroj, kiuj tute ne rilatas esp-on? Ĉu vi recenzis por la, ni supozu, 500 franclingvanoj el la 4000 abonantoj de "S-ulo"? Ĉu vi ankaŭ recenzos holandajn librojn? Mi tute ne ŝatus tion, ĉar tiujn recenzojn mi povas legi en holandaj gazetoj. Aŭ ĉu vi volas instigi nin lerni francan, germ. ktp. lingvojn? Dankon! Miaopinie tio estas malbona uzo de l' gazeto. Kaj ĉiam avertoj: Verku koncize! Volonte mi ricevos klarigon pri tiu ĉi nekompreneblaĵo!"

Ĝis nun ni ja havis kiel regulon recenzi aŭ almenaŭ mencii ĉ i u j n librojn, senditajn al la Redakcio. Se tio malplaĉas al la plimulto da legantoj, ni volonte forstrekos tiun regulon en nia red. regularo. Vortigu vian opinion, K-doj!

K-do 8521, Reichenberg (Ĉeĥosl.), diras en priskribo de siaj unuamajaj impresoj i. a.:

"Mi staris inter ĉeĥlingvaj k germanlingvaj proletoj. Oni parolis du lingvojn. La fremdaj paroloj, kiujn oni aŭdas, ankaŭ fremdigas la homojn k ili neniam sentos sin gefratoj, ĉar oni rigardas ilin kiel du grupojn, kiuj ne apartenas unu al la alia . . . Tial ni devas provi havi unulingvan, esplingvan oratoron por tiaj kunvenoj. Ni devas provi ricevi en niajn vicojn kelkajn gvidantojn de organizoj k partioj, kies paroloj estas atentataj k ŝatataj pli multe ol niaj . . ."

Ĉu vi jam pagis vian kotizon por la jaro 1930? Se ne, tuj faru tion!

Internacia prol. esp. renkontiĝo en Lindaŭ (Bodenlago)

Ĝi okazis 3./4. majo, estis partoprenata de 70 aŭ 75 Gek-doj (40 el Aŭgsburgo en Bavario), k ĉeestis diversnacianoj (germanoj, aŭstroj, svisoj), ĉar la Bodenlago limas al tri landoj. La aktivuloj de l' Aŭgsburga lab. esp.-grupo k SAT-rondo preparis sin frutempe k starigis vojaĝkason, por ke multaj povu partopreni. Ni ekveturis

la 3-an de majo posttagmeze de antaŭ la urbteatro en Aŭgsburgo per aŭtomobilo ambaŭflanke ornamita per afiŝegoj, sur kiu fiere flirtis la SAT-flago. El 22[1] gorĝoj sonis la Internacio malgraŭ la manifestaci-malpermeso. Ĉie, kie ni traveturis, la homoj rigardis nin kurioze, k ofte estis aŭdebla krio "ruĝfronto!", dum migrantoj ekkomprenis, ke temas pri esp-istoj. Vespere je la 20-a ni alvenis antaŭ la ponto kondukanta al Lindaŭ, kiu kuŝas sur insulo. Ni marŝis komune kun nin atendintaj K-doj al la popoldomo, kantante. Dum salutvespero prezentis svisiaj muzikistoj sian arton, paroladis Lindaŭaj K-doj k K-do Stangl el Aŭgsburgo pri nia movado, akcentante, ke esp-o ne estu konsiderata kiel sporto, ke ĝi estas gravega helpilo en nia batalo kontraŭ la kapitalismo.

Lindaŭ estas renkontejo por riĉaj burĝoj: ĉi lastaj konsideris nin verdĉemize vestitajn "fremdlingvanojn" kiel sovetianojn. Ni ne rabis ilian kredon. Dimanĉe ĉiuj promenis laŭvole; kelkaj ekiris al la aŭstria limo (8 km. distanca). Ĝin atinginte ni havis strangan senton, ĉar ni la unuan fojon transiris limon kiel esp-istoj. Post limgardista permeso transiri ni ekkantis la Internacion k estis mansigne salutataj de soldatoj en apudvoja kazerno. Granda ŝvebvagono kondukas al monto Pfender *(Pfänder)*, sed ni rigardis (escepte kelkaj) nur de malsupre, ĉar la veturprezo estis tro kara por proleta monujo. Posttagmeze ĉiuj esp-istoj ekskursis al Heŭer-monto. Forveturante ni preterpasis Fridriĥshafen *(Friedrichshafen)*, por admiri la Cepelin-aerŝipon (teknika miraklo, bedaŭrinde je la servo de l' kapitalistoj). Trans Ulm ni bonstate revenis lunde matene Aŭgsburgon, kun entuziasmo en koroj. *SAT-ano 11 128.*

La 9. Plenkunveno de ALLE (aŭstria LEA)

okazis, kiel ni legas en "La Socialisto[2]", la 20./21. aprilo en *Graz*. Inter la gastoj estis reprezentantoj de hungara LEA (HESL), de l' socialdemokrata partiorganizo, liberaj sindikatoj, oficistoj, fervojistoj, infanamikoj, instruistoj, liberpensuloj, stenografoj k abstinenculoj. El la raportoj estas notinde, ke nova fakgrupo (instruista) fondiĝis. La membrostato estas: 61 lokaj grupoj kun 1549 anoj (en antaŭa jaro: 57 kun 1338); el tio estas en *Vieno* 22 (20) grupoj kun 690 (584) membroj; en la provinco 39 (37) kun 859 (754) membroj; krome 62 (44) izolaj membroj. La pliiĝo sekve estas 299 membroj en jaro 1929/30 (dum 1928/29 la pliiĝo estis 277). Okaze de varbsemajno estis eldonataj 20 mil flugfolioj k 300 afiŝoj. Leteran kurson partoprenis 20, somerlernejon 19 K-doj.

Krom pri ĝeneralaj propagandaj demandoj la plenkunveno speciale atentis pri preparlaboroj por la lab. sportolimpiado okazonta en 1931 en Vieno. Nova redaktoro estas K-do profesoro Simon, respondecaj redaktoroj K-doj d-o Grimme k Jonas, dum K-do Jeitler elektiĝis prezidanto de l' Asocio.

[1] La ceteraj K-doj veturis per motorbicikloj aŭ vagonaro.

[2] Bedaŭrinde neniu sendis al ni rekte raporton pri la kunveno: sekve ni estas devigataj mem ĉerpi la notojn el supra ĵurnalo, k la raporto krome aperas kun unumonata prokrasto. — *Red.*

TRA LA MOVADO
(Kroniko)

ĈEĤOSLOVAKIO. 20. aprilo okazis jarkunveno de Ĉeĥosl. Lab. Esp.-Ligo en Praha, kiun partoprenis K-doj el Praha k delegitoj de 6 grupoj. Dum la jaro aliĝis 3 novaj grupoj. Kotizis dum la kuranta jaro 163 membroj. Al la esp-lingva Bulteno de nun estos aldonataj propagandfolioj en ĉeĥa k germana lingvoj. La redaktadon de l' Bulteno prizorgos K-doj el div. Plzenaj grupoj (por germanlingva parto K-do Ŝvajnfurter, Holiŝov); la sidejo de l' Ligo restas en Praha. — *JAPANIO. Tokio.* La kursoj aranĝitaj por komencantoj ĉe Instituto por Scienco Proleta, en du lokoj, unu por laboristoj, alia por intelektuloj, kun ĉ. 100 p. sume, finiĝis kun granda sukceso je 5. IV. 30. — *SOVETIO. Barnaŭl.* La sukcesoj en tiu ĉi urbeto kun 85 mil loĝantoj, kies signifo pliiĝos post malfermo de l' Turkestan-Siberia fervojo, estas tre rimarkindaj: kun 112 SAT-anoj (70 SEU-anoj) ĝi povas konkuri kun plej grandaj urboj. Depost 1. majo *por ĉiuj lernejoj de l' urbo estas decidita deviga instruado de esp-o.* La oficiala dokumento pri tio, menciinte la multajn atingojn en interligo k edukado per esp-o, konkludas: "Nei utilon k gravon de esp-o en nuna stato de kultura movado neniu povas k oni devas ĉiel subteni la movadon". Dum kunsido de ĉiuj lernejestroj (16. IV.) la demando pri deviga instruado estis pozitive subtenata de ĉiuj, k tiu decido efektiviĝis ĝis 15. V. Ankaŭ la 4-a tutdistrikta konferenco de Ruĝa Helpo (MOPR) decidis unuanime rekomendi al ĉiu aktiva membro lerni k apliki esp-on, kiel rezulto de ĝisnunaj interligaj sukcesoj. La ĉefa ĵurnalo enhavis jam 15-an lecionon de kurso. Dum 1. maja festo aperis flugfolio de profunuiĝoj k IRH en rusa k esp.-lingvoj (verkita de esp-isto) (13 503).

Municio al SAT kaj ĝiaj organoj

Muribo (Oslo) 1 kr. norv.; Manning (6833) 10,70 mk. g.; Simon (6604) 1 mk. g.; (221) 1,20 mk. g.; (11 408) 3,12 mk. g.; (14 419) 5 zlot.; (13 532) 20 fr. fr. — Brikoj: Ĵeleznjakov (Samara) 6 rubl.

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Internacia Ekspozicio de Socialista Arto Hodiaŭa. 6-lingva prospekto pri aliĝo al tiu Amsterdama Ekspozicio. Adr.: S. K. K., Jan W. Jacobs, Fraunhoferstr. 37, *Amsterdam* (Holando). Esperanto estas inter la lingvoj uzataj de la organizantoj. Artistoj postulu formularon por ensendo de verkoj.

NIA POŜTO

14 480. — Se vi legus kun pli da atento k komprenemo, vi certe trovus en "For la Neŭtralismon!" k en "La Lab. Esperantismo" respondon al viaj demandoj. Mi povus nur ripeti per aliaj vortoj, kion mi jam diris en tiuj verketoj. Bonvolu, ekzemple, relegi la ĉapitron VII de "La L. E.". Estu ĉi tie nur aldonite, ke mi ĝojus, se UEA havus 50 000 membrojn! — kondiĉe, ke tiuj membroj ne estu proletoj. Esp-o estas nepre necesa ilo por ke solide efektiviĝu la unuiĝo de l' tutmonda ekspluatataro; sekve, ĉio k ĉiu, kiu helpas disvastigi, popularigi la ilon, devas iel havi nian simpation. Sed la ilon mem ni uzu por niaj propraj celoj. Tiu lasta konsidero pravigas la ekziston de SAT. — Oni ankaŭ povas tute logike simpatii al la *sciencaj* laboroj de iu, kies politikaj opinioj estas kontraŭbatalendaj. — *E. L.*

13 059. — Ni uzos vian materialon, tiom kiom la spaco permesas, sed certe parton. La antaŭan materialon ni bone ricevis. Ni informis K-don H. P. pri via deklaro rilate al kunlaboro.

K-do Ŝutov. — Viaj versaĵoj tute taŭgas por "L. L.", en kiu ili aperos okaze.

Herta M. — Ni transsendis vian artik. al la redaktoro de "Senn. Ped. Revuo".

13 503. — Interŝanĝ-alvoko povas aperi nur kiel pag-anonco. — *Red.*

11 128. — Nekrologo por membro, paginta sian kurantan jaran kotizon, estas senpaga.

2759. — 3.52 mk. g. ni kvitancis por "Lab. Esp.-Traktoro".

Adm.

2 POPULAR-SCIENCAJ VERKOJ

kiuj konatigas vin per klara, facile komprenebla lingvo kun la atingoj de moderna fiziko k kemio:

EL LA MONDBILDO DE L' NOVA FIZIKO de D-ro Reiche; trad. Muravkin. 52 pĝ. 11×17 cm.

LA KEMIO DE LA UNIVERSO de akademiano Fersman, 80 pĝ. 11×14 cm.
Ambaŭ libretoj estas eldonitaj de SAT. — Prezo po volumo: *0,60 mk. g.*

Adm. de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27.

KORESPONDADO

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0.80 mk. g., ĉiu plia linio 0.50 mk. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago. L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl. = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo. Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

AŬSTRIO

K-dino Amalie Heinz, *Klein-Neusiedl Nr. 77,* kĉl. pri ĉ. temoj, L, PI, PK. Resp. garantiata.

K-do Francisko Reiter (15 499, kursgvidanto), *Niklasdorf 1 ĉe Leoben,* Stirio, serĉas gekoresp-antojn por siaj gekursanoj k por si mem.

ĈEĤOSLOVAKIO

K-do Bohumil Fiŝer, Cermná ĉ. 49, *poŝto Staŭkov u. Domazlic,* kĉl., L, PI.

K-do Max Weber, Warnsdorfer Str. 70, *Schönlinde,* kĉl., PI Resp. garant.

ESTONIO

Adresŝanĝo. — K-do N. Ruus (15 428) estas nun en Svedio, *Stockholm,* poste restante (antaŭe en Pärnu).

FRANCIO

Lab. Esp. grupo de Villejuif koresp. kĉl. Adr.: K-do Petro Boisson, 22, rue Voltaire, *Villejuif,* Seine.

GERMANIO

— Grupo de gekomencantoj (diversprofesiaj), serĉas koresp-adon kĉl. Skribu al: K-do Peter Hermanns, Zu den Eichen 42, *Duisburg-Wedau.*

K-do Nik. Mungai, Hasenkampstr. 3, *Bottrop, Westfalen,* kĉl., pri ĉ. temoj, krom Sovetio.

K-do Hans Neubert (17 j.), Am Brennhaus 5-a, *Frankfurt-Griesheim,* kun fotoamator(in)o.

— 12 Gek-doj serĉas koresp-adon kĉl., L, PK, PI, PM, gaz. Adr.: K-do Alvin Sommer, Haldenerstr. 24, *Hagen, Westfalen.*

K-do Walter Gohrke (25 j.), Schiebestr. 31, *Leipzig N 21,* kun Gek-doj en Hispanio pri ĉ. temoj. Resp. garant.

K-do Hugo Hein, Breitestr. 30, *Diemitz b. Halle (Saale),* kĉl., L, PK, PI, gaz. Resp. garantiata.

K-do Fritz Legler (fotoamatoro), Chemnitzer Str. 70, *Dresden-A. 27,* kĉl., nur PI. Resp. garantiata.

K-do W. Vogel (23 j., socialdemokrato), Moreaustr. 17, *Dresden-A. 24,* kĉl., pri ĉ. temoj, krom Sovetio, L, PI. Resp. garantiata.

K-do Fritz Frotscher, *Friesen 25 ĉe Reichenbach, Vogtlando,* kĉl., PI, PM, bfl.

K-do Helmut Schink, *Rotschau ĉe Mylau, Vogtlando,* kun Gek-doj, kiuj vizitos la sportolimpion en Vieno 1931, pro persona renkontiĝo.

HISPANIO

— 2 junaj amikinoj koresp. kun Gek-doj el ĉl.: Elisa Claverol (15 j.), C. Moncada 100, Carmen Palomares (15 j.), C. Moncada 166, ambaŭ en *Tarrasa.*

Muziko. — 16 j. muzikstudento interŝ. hisp. melodiojn k koresp. kun muzikistoj k muzikamatoroj, PM, il. gaz. Adr.: Francesc Chaler Mur, (pianisto), Sn. Mariano 124, *Tarrasa.*

HUNGARIO

— Lab. Esp.-Grupo (20 membroj) koresp. kĉl., pri ĉ. temoj. Adr.: Csillag-u. 2, *Pesterzsébet.*

ITALIO

K-do Angelo Facchi (24 j. fraŭlo, arĥitekto), via Clerici, 10, *Milano,* kun sovetiaj Gek-doj, L, PI, pri ĉ. temoj; Precipe interŝ. nacilingv. gazetojn. Daŭra k senantaŭjuĝa koresp-ado preferata.

NEDERLANDO

K-do Josefo Wieser, Korianderstr. 84, *Eindhoven,* kĉl. L, PI, bfl., pri ĉ. temoj. Resp. garantiata.

POLIO

Kleriguloj! — Kiu volas lerni novan, interesan formon de koresp-ado, tiu, okaze de nia sport-kongreso, tuj sendu salutleteron al K-do K. Laskowski, str. Ksawerowska 21 (S.), *Bendzin.*

SOVETIO

K-do V. S. Mironov, Krasnoarmejskaja 78, kv. 2, *Samara,* pri junulvivo, laboro ktp., L, PI, il. gaz.

K-do Jouko Pulkkinen (14 j. lernanto), *St. Vsevoloĵskaja,* Okt. ĵel. dor., kĉl., pri ĉ. temoj, L, PI, il. ĵurn., PM. Nepre resp.

K-dino V. Buneviĉ, ul. Verĥnekrasnoselskaja, 26, kv. 2. *Moskvo,* kĉl., pri ĉ. temoj. Nepre resp.

K-dino A. Bodunova (18 j.), ul. Mal. Perejaslavskaja 9/11, kv. 10, *Moskvo 41,* kĉl., pri ĉ. temoj, PI, gaz.

K-dino E. A. Dmitrieva, ul. 5-a Sokolinaja gora, 17, kv. 1, *Moskvo 20,* kĉl., pri ĉ. temoj, gaz. Tuja respondo.

K-do V. K. Makarov, Tuzov proezd, 8, kv. 5, *Moskvo 18,* kĉl., pri ĉ. temoj, PK, PI. Resp. garantiata.

— Gvidanto de esp. rondeto, koresp. kĉl. fervojistoj. Tuj resp. Adreso: *Moskvo,* Gorohovskaja 8, Klubo je la nomo de Kuĥmisterov.

— Kiu volas havigi al si belan serion de PK il. el Mez-Azio (historiaj ruinoj, popoltipoj ktp.)? Skribu multnombre al: K-do Grunskij, *Aŝĥabad,* Pravl. Turkmen-Sauda. — Resp. garantiata.

— Ĉelo de komjunularo ĉe komerchaveno koresp. kun lab. junularo, precipe kun maristoj. Adr.: *Sebastopol,* Klub "Marti", jaĉejke, V.L.K.S.M., Torgporta.

— Blindula esp. rondeto koresp. pri div. temoj kun blinduloj ĉl., L, simple k brajle. Adr.: *Sebastopol,* ul. Karl Marks, 39, V. O. S.

— Esp. rondeto junpionira koresp. kun gepioniroj ĉl., L, PK, PI. Resp. garantias 9356. Adr.: *Sebastopol,* Artilerijskaja ul. 22, pionerskaja ŝkola 15.

— *Konstru-laboristoj tutmondaj!* — kiu volas koresp. kun ni — kolektivo de konstruistoj en Sebastopolo? Skribu pri profesiaj k politikaj temoj al adr.: *Sebastopol,* ul. Lenin 16, Akstroj, 1, Raboĉkom stroitelej al K-do Ĉerkaŝin.

— Gelaboristoj k oficistoj koresp. kĉl. Gek-doj pri div. temoj. Resp. nepra. Adr.: *Barnaul,* Zavkom Ŝvejnikov (kudrista fabrikkomitato), Gogolstr. 44.

— Viglan koresp-adon garantias 150 gestudentoj pri ĉ. temoj, kĉl. Adr.: Ukrainio, *Kremenĉug,* Pedagogia Teknikumo.

Nekrologo

Nia fervora K-do, SAT-ano 14 070,

IZIDOR RIEGER

mortis la 14-an de majo kiel viktimo de la hombuĉado mondmilita. Kun blasfemo kontraŭ la kapitalisma socio rdo sur la lipoj, li ĉesigis sian bataladon.

Ĉiam honoran memoron al li!

SAT-Rondo Aŭgsburga.

8 Knaboj el Tarrasa (Hispanio)

korespondos kun ĉ. l. geamiketoj:

Antoni Bofill, 13-jara, Str. S. Mariano 135
Jesus Sellarés, 12-jara, Str. S. Mariano 109
Hans Weichel, 10-jara, Str. Baldrich 117
Arcadi Vallesti, 13-jara, Cra Sabadell 18
Domenec Tomás, 11-jara, Str. Torrella 70
Rafel Palan, 13-jara, Str. F. Salvochea 116
Josep Padros, 12-jara, Str. Prim 108
Johan Chaler, 13-jara, Str. San Marian 124

Deziras koresp.

k interŝ. PK jenaj Gek-doj: Svea Carlsson, Smedjan; Einar Carlsson, Smedjan; Gunnar Carlsson, Smedjan; Nils. El. Persson, Nr. 6: Ynge Persson, Nr. 6; Hans Persson, Nr. 2; Erik Persson, Nr. 2; Tage Nord, Nr. 4; Nils Andersson, Nr. 4; Josef Leden k Ruth Frost, Nr. 4. Poŝta adreso por ĉiuj: *Svalöv* (Svedio).

Kunlaborantoj de Moskva Seninfektiga Oficejo dez. koresp. kun oficialaj ŝtataj institucioj k apartaj esp-istoj pri sperto de desinfekto, seninsektiga k senratiga aferoj. USSR, *Moskvo,* Kalanĉevskaja placo, klubo KOR por Desbjuro.

Letervespero

por eŭropanoj kaj ekstereŭropanoj

Laborista Esperanto-Grupo Pirmasens (Pfalz) aranĝos la 3. julio por eŭropanoj k la 7. aŭgusto por ekstereŭropanoj letervesperon pri ĉ. temoj. — Gek-doj el ĉ. landoj, sendu multnombre L, PK, PI, gaz., ĵurnalojn al: K-do Friedrich Kärcher, Homärtelstr. 16, *Pirmasens* (Pfalz), Germanio. — *Ni certe respondos!*

ENHAVO:

	pago
Krizo en Germanio	405—07
Ĉirkaŭ la laboristaj organizoj	407
La Industri-Akademio en Moskvo	407—08
Policistoj kiel ŝtelistoj	408
Ĉeeste kun grandaj spiritoj	408
La kalejdoskopo de l' vivo	409
El usona taglibro	409—10
La evoluo sen dio	409—10
Minutoj el mia vivo	410
Primilitaj pensoj	410
Diskutejo	410
Esperanto-Servo	411
Sporta Paĝo	412
Tra Esperantio	413—15
Korespondado, Anoncoj	416

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)